


La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

Nro 1/1988

Pentekoste en Sundsvall



Promene tra la urbo

Kvalitets- auktionerna

Godbitarna nr 1 - 4, 9, 24 och 26 försvann naturligtvis till höga priser plus ytterligare några böcker, som vi har flera exemplar av. Nu får du en ny chans att bjuda på de kvarvarande numren. Du berikar ditt bibliotek och SEF:s kassa.

Nyttillkomna medlemmar, som inte har fjolårets två sista *La Espero* med boklistorna, kan fråga efter dem på Esperanto-Centro.

Vänta inte med att sända in ditt bud till Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 STOCKHOLM.

Varmas en Romo och Tinçjo - La nigra insulo

är vårens böcker i
Nova Libro, vår egen
bokklubb.

Gamla medlemmar får
snart ett nytt bokpaket
och nya intresserade
kan anmäla sig till:

Nova Libro
EsperantoCentro
Brunnsgatan 21
111 38 Stockholm

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,
tel. 0589-155 31

Sättning: Per Arne Fritzson och Roy Auer, EsperantoCentro

Utformning: Franko Luin, Tyresö

Tryck: EsperantoCentro, Stockholm 1988

Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,
tel. 08-11 74 34

Öppettider: måndag - fredag kl. 10.00 - 14.00; måndag - torsdag även
17.30 - 19; vissa lördagar kl. 10.00 - 12.00.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 100 kr. Familjemedlem (utan tidning) 50 kr.

Ungdomsmedlem 50 kr.

Enbart prenumeration: 100 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 50 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters
Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den,
meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

SEFs styrelse

Ordförande: Karin Lindquist, Västermovägen 19, 732 00 Arboga,
tel. 0589-155 31 (La Espero, massmedier)

Vice ordförande: Märtha Andréasson, Pl. 2265, 425 00 Hisings Kärra,
tel. 031-57 11 33 (Årskongresser, ekonomifrågor)

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö,
tel. 08-712 82 91 (kansliet)

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde,
tel. 0500-122 05 (massmedier)

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Ringvägen 11B, 579 00 Högsby,
tel. 0491-204 61 (turnéer, bibliotek)

Styrelseledamot: Åke Rohdin, Engelbrektsgratan 25A, 702 13 Örebro,
tel. 019-18 53 60 (intern.org.)

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping,
tel. 011-16 26 87 (utveckling, intern.org.)

Suppleant: Ingemar Nordin, Mosebacke torg 8, 116 46 Stockholm,
tel. 41 46 37 (kansliet)

Suppleant: Bertil Andreasson, Södra Rörum, 242 00 Hörby,
tel. 0415-501 52 (utbildning, nordiskt samarbete)

Informationskommittén: Bernt Lindquist, Västermovägen 19,
732 00 Arboga, tel. 0589-155 31.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Öppettider: 1 september - 15 maj: onsdagar 10 - 11, torsdagar 17 - 18.

Skriftliga beställningar expedieras under hela året, även under sommaren.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Anita Lindblom.

Enhavo

- 3 Prezidanto: La jubileo ankoraŭ ne finiĝis
- 4 Aliĝu al la jarkongreso de SEF dum pentekosto
Provizora programo
- 5 Vad du behöver veta för att anmäla dig
Kongressavgifter
- 6 "Klubo EC" kan rädda EsperantoCentro!
100 000
- 7 TRA LA LANDO:
8-semajna kurso en Karlskoga
La sveda maratono
- 8 Suda distrikto
TEDU-aktiviteter
- 9 Nybildad klubb i Skara
Memore al Ivo Lapenna
- 10 Recenzo: La Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro
- 12 Interhoma kompreniĝo.
Interpopola paco
El la Fina dokumento de Helsinki
- 14 Kultura Esperanto-Festivalo # 2
ILEI-konferenco
Dana jarkongreso 1988
- 15 Esperantobok på svenska
Geedziĝo
85-jara Karl Söderberg
- 16 Alva Myrdal –
Esperantisto dum juneco
Vi påminner om ...

Prezidanto:

La jubileo ankoraŭ ne finiĝis

La estraro de UEA decidis formale fermi la jubileon per speciala ceremonio dum la Universala Kongreso en Roterdamo kaj daŭrigi la jubilean periodon ĝis tiam. Ĝi alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj daŭrigi la laboron, kaj eĉ plani novajn agadojn.

Kompreneble ni daŭrigos la laboron por disvastigi la scion pri Esperanto - ĉu en aŭ ekster la kadro de la jubileo, ne gravas. Sed dank'al la jubileo ni havas "bonan venton en la veloj". Tion ni devas utiligi.

1988 - la jaro de homaj rajtoj laŭ proklamo de UN

"Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kan konsciencan, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato."

Jen la teksto de la unua kaj dua artikoloj de la Deklaracio de Homaj Rajtoj. (La emfazio estas mia.)



En la Deklaracio oni trovas eksplicitan certigon, ke ni ĉiuj havas saman valoron, sendepende de niaj kondiĉoj, en ĉiu rilato, do kompreneble ankaŭ lingve. Oni plue akcentas la egalecon inter homoj, ankaŭ la lingvan egalecon. Oni taksas, ke hodiaŭ ekzistas pli ol 4.000 diversaj lingvoj. Kontraŭ tiu fono, lingva egaleco ŝajnas utopia.

Por estigi tian egalecon, estas necese trovi ilon. Kio estus pli natura ol uzi internacian kaj neŭtralan lingvon kun ebleco evolui, sufiĉe esprimplenan, tiel establitan, ke ĝi jam montris sian vivpovon. Tiu "ilo" jam ekzistas - Esperanto.

Komuna informa kampanjo de UEA al ĉiuj UN-asocioj en la mondo pri tiu fakto, tio estu la kontribuo de la internacia Esperantomovado al la temo de UN dum 1988. En Svedio ni jam komencis nian informkampanjon al la UN-asocio. Ni nome invitis ĝian prezidanton, la parlamentanon Karl-Erik Svartberg, al nia jarkongreso en Sundsvall.

Karin Lindquist

Aliĝu al la jarkongreso de SEF dum pentekosto

Ci-jare nia sveda jarkongreso okazos en sufiĉe norda urbo de nia lando. Tial ni pensas, ke kelkaj samideanoj el niaj najbaraj landoj interesiĝas pri partopreno.

La fino de majo ofte estas tre agrabla sezono tie ĉi, kiam la naturo vekigigas kaj povas esti jam sufiĉe varma. Ni provos fari varian programon, kun mikso inter kulturaj, distraj kaj ekskursaj programeroj.

Tiuj de vi, kiuj ne komprenas la svedan lingvon en la prezento kaj kotiztabelo: Bonvolu skribi rekte al la LKK por peti pli da informoj, aŭ helpon pri la mendo de de hotelo aŭ aliaj aferoj.

Skribu al:

Ingrid kaj Åke Näsholm,
Linderbergsvägen 4,
S-852 47 SUNDSVALL,
aŭ

Gunnar Farm,
Ludvigsbergsvägen 37,
S-852 34 SUNDSVALL.

Kongress- brevmärken

Använd och propagera för Sundsvalls-kongressen! Köp kongressmärken hos SEF-Jarkongreso, c/o Näsholm, Linderbergsvägen 4, 852 47 Sundsvall, pg 481 43 95 - 2.

1 ark = 6 märken kostar 5:-
5 ark = 30 märken kostar 20:-

Motivet är skvadern. Det är ett djur hopsatt på skämt av en hares framkropp och en tjäders bakkropp. Den har blivit ett slags maskot för Sundsvall.

Provizora programo

Vendrede 20/5

- 16.00: Malfermo de la kongresejo
19.00: Interkona vespero kun eventualaj distraĵoj

Sabate 21/5

- 09.00: Ni rigardas la urbon (same kiel dimanĉe 13.30)
Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto
11.00: Diskuto pri agadplano 1988-89
12.30: Lunĉo
13.30: Malfermo. La prezidanto de la sveda parlamento malfermos la kongreson (event.)
15.00: Kafo/teo
15.30: Prelegoj de la prezidanto de la UN-asocio, parlamentano Karl-Erik Svartberg, pri homaj rajtoj
17.30: Podia diskuto pri lingvoj kaj homaj rajtoj
20.00: Supeo
Junulara programo aranĝita de SEJU

Dimanĉe 22/5

- 08.00: Diservo
10.00: Jarkunveno de SEF
12.30: Lunĉo
13.30: Jarkunveno de SEJU
Jarkunveno de la instruistoj
Ni rigardas la urbon (same kiel sabate 09.00)
15.00: Komuna ekskurso al la arbara bieno Gudmundstjärn, kul turhistoria unikaĵo en Svedio (kosto inkludita en la kongreskotizo). Dum la vizito estos proponataj kafo/teo kaj buterpano. La tiea programo enhavos ankaŭ kulturan parton kun muziko, teatro aŭ simile.
19.00: Vespermanĝo
20.00: Aŭkcio
21.00: Distra programo

Lunde 23/5

- 08.30: Kunveno por la respondeculoj de la regionoj
09.00: Komuna kaj grupaj diskutoj pri la estonta Esperantolaboro. La diskuto baziĝos sur la proponoj de la kluboj.
11.00: Fermo de la kongreso
11.30: Ekskurso al la fiŝista vilaĝo Spikarna. En ties kafejo oni trinki kaj manĝi. (Aparta aliĝo.)
14.00: Reveno

Vad du behöver veta för att anmäla dig

Årets kongress kommer att hållas på Hotell Sundsvall (f d OK Hotell), som ligger ca fem minuters promenad från stadens centrum. Hotellet är samtidigt Folkets Hus och har många bra lokaler. Banketten kommer att hållas på ett annat hotell, nämligen på Södra Bergets topp.

Vi tar inte upp bokning av hotell i denna anmälan, utan den gör ni direkt till hotellet. Följande hotell kan vi rekommendera:

HOTELL SUNDSVALL

Esplanaden 29, 852 32 Sundsvall, tel. 060/17 16 00 (i anslutning till kongresslokalen)

Pris: Enkelrum 355:-, dubbelrum 230:-/pers., inkl. frukost.

HOTELL NEPTUN

Sjögatan 11, 852 33 Sundsvall, tel. 060/15 07 20 (10 min promenad från kongresslokalen)

Pris: Enkelrum 250:-, dubbelrum 162:50/pers.

Billigare alternativ

För er som söker ett billigare boendalternativ, kan vi rekommendera vandrarhemmet "Gaffelbyn" på Norra Berget (20-30 minuters promenad till kongresslokalen.). Där kostar det mellan 60 och 105 kr, beroende på antalet personer och medlemskap i STF. Ring direkt 060/11 21 19 mån-tor kl. 16-18 för närmare upplysningar och bokning.

SEJU 30 år

Eftersom kongressen i år sammanfaller med SEJU:s 30-årsjubileum, kommer vi att lägga ner extra möda för att hitta lockande programpunkter för er som tillhör denna kategori. Vi har inte någon

lägre anmälningsavgift för ungdomar, men däremot erbjuder vi fri plats på golvet i en skolsal. Ange på inbetalningen om ni vill reservera plats! Skolan ligger ca 10 minuters promenad från centrum och kongresslokal, och kommer också att erbjuda plats



för ett alternativt kvällsprogram samtidigt med banketten.

Kongressavgiften inkluderar i år en bussutflykt (med förtäring och underhållning) till det vackra "Gudmundstjärn". Sista anmälningsdag för ordinarie avgift är 17 april!

Vid anmälan kan ni, om ni vill göra det extra bekvämt för er, beställa konferenslunch och eftermiddagskaffe. Det bör dock påpekas att det finns gott om alternativ på nära håll. Bl a håller hotellets egen barservering öppet från frukost till kl 15.00. Där kan man t ex köpa "bricklunch" för 35 kr. Från kl 15.00 till klockan 02.00 på natten håller sedan hotellets "bistro" öppet.

Kongressavgifter

	Pris	Kod
Kongress inkl. utfärd (buss, mat o. underhållning) t o m 17 april	175:-	A
Kongress inkl. utfärd efter 17 april	200:-	B
Utfärd till Spikarna 23/5	25:-	C
Kongressmärken, karta med 6 märken (självhäftande)	5:-	D
Ungdomar, plats i masslogi (ingår i kongressavgiften)	--	E

Måltider:

Supe på Södra Stafsberget 21/5 (inkl. buss)	140:-	F
Alternativt ungdomsprogram på Åkersviks skola	50:-	G
Landgång med kaffe/te, kvällen 20/5	45:-	H
Dito kvällen 22/5	45:-	I
Konferenslunch 21/5	80:-	J
Dito 22/5	80:-	K
Eftermiddagskaffe 21/5	20:-	L

Betala till pg 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso, c/o Åke Näsholm. Linderbergsgatan 4, 852 47 Sundsvall. Ange på inbetalningskortet koderna för de poster du betalar för.

”Klubo EC” kan rädda EsperantoCentro!

De redan nu höga hyreskostnaderna för EsperantoCentro i Stockholm ser ut att bli ännu högre. Hyresvärden har aviserat en kraftig höjning från den 1 oktober 1988.

För att kunna klara de höjda hyrorna och säkra möjligheterna att ha kvar EsperantoCentro, har SEF:s styrelse beslutat inrätta ”Klubo EsperantoCentro”. Klubbar och medlemmar, som vill visa sitt intresse för att EsperantoCentro behålls, kan betala in två procent av hyreskostnaderna. Femtio sådana ”medlemmar” innebär att hela hyran är betald...

Den nuvarande årshyran är 45.220 kr. Två procent av detta belopp innebär alltså 904,40 kr – men en tusenlapp är ju en jämn och bra summa...

Kungälv's Esperantoklubb har redan visat vägen genom att vid årsskiftet skänka just en tusenlapp! Tvåprocentsmedlemmarna kommer givetvis att redovisas i *La*

Espero, liksom de som skänker andra belopp.

Klubo Cent kvarstår för dem, som vill ge 100 kr till SEF:s verksamhet. Även där finns möjlighet att skänka mer, och även där finns en ”vägvisare”: Erik Swärd i Malmö har redan noterat sig för 200 kr.

Största betydelsen för SEF – näst medlemsavgifterna – har dock under 1987 de allmänna gåvorna haft. 25.467 kr blev den sammanlagda donationssumman,

fördelad på många stora och små poster. Ingenjör Sven Sundins i Växjö storartade aktiedonationer svarar för över hälften av summan.

Alla sorters penninggåvor – utan vilka förbundet inte skulle kunna vara verksamt – kan sättas in på Esperantoförbundets postgirokonto 20 12 - 3. Ange på talongen vad gåvan avser.

Koran dankon anticipe!

Styrelsen

100 000

Du är säkert medveten om att förbundet är i skriande behov av pengar. Hyror går upp, priser ökar, portot stiger. Hur ska vi få in 100.000 kr på stubben? Ja, egentligen är det ganska lätt. Här är några förslag:

1. Var och en av oss skaffar en ny medlem, som betalar in medlemsavgift. Det ger mer än 100.000 kr och kostar oss personligen ingenting och medför desutom, att beloppet kommer allt framgent år efter år. Ett suveränt förslag.

2. Var och en av oss betalar in dubbel medlemsavgift, då når vi över beloppet 100.000 kr. Då blir vi alla medlemmar i Klubo Cent. Det är väl realistiskt?

3. Nästan alla av oss, ett tusental, köper den första läroboken, som vi tryckte om till jubileet, men som nu ligger kvar på EsperantoCentro. Det ger samma belopp att delas mellan förbundet och förlaget. Den kostar 100 kr som ska sättas in på förbundets postgiro.

4. På den enkät som ordföranden sände till klubbarnas styrelser med anhållan om synpunkter på olika ämnen, bl a förbundets ekonomi, kom ett förslag, att alla medlemmar skulle sända in en födelsedagsgåva på sin födelsedag, en omvänd gåva alltså, lika många kronor som man fyller. 15-åringen ger 15 kr och 90-åringen 90 kr. Det skulle säkert ge mer än de 100.000 och kunde samtidigt vara en rolig grej.

5. De av oss som har lite pengar över, sänder in ett stöttre belopp. Ett hundra skänker 1.000 kr eller tio stycken skänker 10.000 kr.

Välj nu själv! Om vi allihop bestämmer oss för något av av de fem alternativen och agerar därefter, så når vi summan. Eftersom man alltid måste räkna med att någon ”glömmer”, så bör några ta flera alternativ. Förbundets postgiro är 20 12 - 3.

Ingemar Nordin

Esperantoexamen

Skrivningsdag för esperantoexamen blir i år den 24 april. Såväl lägre som högre esperantoexamen kan avläggas. För vidare upplysningar om reglemente, krav och kostnader vänd er till Esperanto-Institutet, c/o Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 GÖTEBORG.

Tra la lando

8-semajna kurso en Karlskoga

La 11-an de januaro komenciĝis 8-semajna kurso de Esperanto ĉe la popolaltlernejo de Karlskoga. La lernejestro speciale bonvenigis la kurson, ĉar supozeble estas la unua longa kurso Esperanta en la historio de la popolaltlernejo.

La partoprenantoj loĝas en unu el la komfortaj kursloĝejoj de la lernejo, kaj tie vere estas bona etoso vespere, la aliaj lernantoj volonte vizitas la esperantan loĝejon. En la lernejo estas multaj naciecoj – eritreanoj, irananoj, kurdoj kaj homoj el ekz. Kanado, Italio, Svislando kaj Vjetnamio. Ili tre ŝatas la internacian atmosferon.

Al nia Esperantokurso venis ankaŭ junulo el Francio. Li korespondas kun svedino, kaj eksciis pri la kurso ĉi tie. Partoprenas ankaŭ polino kaj ĉeĥino, sed tiuj du nun loĝas en Svedio.

La plej multaj el la grupo ne lernis Esperanton antaŭe. Tial mi komencas per facila enkonduka kurso. Mi instruas laŭ modifita rekta metodo per bildoj, desegnoj ktp, sed ne mankas ekzercoj pri gramatiko, vortfarado, skribo kaj reala scio. Por kelkaj ekzercoj ni uzas la lingvolaboratorion.

Post kvin tagoj unu el la veraj komencantoj diris: Estas stranga sento skribi eseon en, antaŭ kelkaj tagoj, fremda lingvo. Ankaŭ la lokaj ĵurnaloj skribis longajn artikolojn pri niaj aktivecoj, kaj Radio Örebro dissendis intervjuon kun kelkaj el la grupo.

Do, la kurso daŭros ankoraŭ sep semajnojn kaj mi pensas, ke miaj lernantoj poste havos ĉiutagan scion pri la lingvo. Kelkiuj volas partopreni ankaŭ la daŭr-

igan kurson, kiu komenciĝos la 14-an de marto, sed estas ankoraŭ eble aliĝi al tiu kurso 8-semajna.

Bonvolu diskonigi scion pri ĉi tiuj kursoj ĉe amikoj, kluboj, studrondaj asocioj kaj lernejoj. Partoprenantoj en ĉiuj aĝoj estas bonvenaj. Vere estas bona okazo por ekz. estontaj instruistoj, kiuj ĝis nun ne havis sufiĉan eblecon aŭ tempon lerni Esperanton.

Lars Forsman
Lingvoinstruisto en la popolaltlernejo de Karlskoga

La sveda maratono

Kun peco da kuko en unu mano kaj la telefono en la alia, mi rapidas alvoki Kerstin Rhodin post ricevo de ŝia mesaĝo por kontakto. Mi estis en Gotenburgo, lasta haltejo de mia prelegmaratono tra Svedujo. Kontraŭe al mia peto, ŝi donis la bonajn novaĵojn unue kaj laste la taskojn: Verki raporton por ŝi kaj artikolon por *La Espero*.

Kiel sciencisto, mi estis jam delonge alktimiginta al redaktado de sengustaj raportoj. Sed verki artikolon postulas iom pli ol paperon kaj skribilon.

– Ne necesas longa artikolo, ŝi diras, nur kelkaj vortoj pri viaj impresoj kaj rezultoj.

– Hm, bone, mi klopodos, mi respondis, maĉante mian kukon.

Sed nun mi sidas antaŭ la skribmaŝino en Trondheim (Norvegujo) kaj konstatas, kiel malfacile estas plenumi la promeson. Mi cerbumadas pri la artikola teksto kaj heziteme tajpas la unuajn liniojn.

Ĉar miaj profesiaj kutimoj devigas min ĉiam uzi ciferojn, jen

kelkaj por pruvi, kiel malfacila estas la tasko komenti mian turneon: Dum 26 tagoj mi vizitis 20 lokojn kaj faris 34 prelegojn. Entute mi parolis al proksimume 650 homoj, el kiuj ĉ. 400 aŭdis unuafoje la internacian lingvon.

Sendube ekzistas malpli lacigaj manieroj ekkoni Svedujon, sed eble ankaŭ malpli interesaj. Mi estis en urboj grandaj, malgrandaj kaj eĉ en etaj vilaĝoj kun manpleno da domoj. Mi parolis kun homoj diversspecaj kaj diversagaĝaj, eĉ infanoj. Kaj kun ili mi babilis, interŝanĝis ideojn kaj spertojn, en iliaj hejmoj, laborejoj kaj lernejoj. Mi povas nur esperi, ke por ili ĉiuj mia vojaĝo estis samgrade kontentiga.

Cie mi prelegis pri Brazilo, tiu preskaŭ nekonata lando, de kie mi venas. Cie mi rikoltis mirmienojn informante pri la geografio, historio, kulturo, ekonomio kaj politiko de tiu lando pli vasta ol la tuta Eŭropo.

Sed mi pekus pri trouzo de spaco aŭ forgesiga koncizeco, se mi klopodus surpaperigi impresojn kaj rezultojn, kiel petis Kerstin Rhodin. Prefere mi parolu pri konstatoj: Unue, la esperveka entuziasmo de kelkaj etaj ĵusnaskiĝintaj grupoj, kies membroj, kvankam ankoraŭ balbutantaj, verve kaj apogende agadas. Kaj due (la ciferoj parolas por si mem), estis la propaganda efiko de la aranĝoj por neesperantista publiko *pere de Esperanto*. Ĉi-ri-late la novaj grupoj laŭdirinde elstariĝis: El la 14 prelegoj por nemovadanoj, 8 estis organizitaj de ili. Imitinda ekzemplo.

Nun mi tajpas la lastajn liniojn pri mia sveda maratono (laŭdire rekorda) kun renovigitaj esperantoj je nia centjara movado kaj kun la impreso (jen por vi, Kerstin!), ke mi konas ĉiujn stacidomojn de suda Svedujo!

Marco Dutra

Suda distrikto:

Lingva seminario

La 14-an de novembro la Suda Distrikto aranĝis lingvan seminarion en Malmö sub la titolo: "Kiel la vortaro respegulas esperantaj lingvajn problemojn".

D-ro Ebbe Vilborg eminente gvidis la seminarion kaj 26 personoj partoprenis. La ĉeestantoj laboris en grupoj kaj provis solvi diversajn problemojn koncerne novajn vortojn, naciajn esprimojn, modernajn parolturnojn, ktp. Estis ege interesa kaj stimula tago.

Esperantoekzameno

La Suda distrikto intencas ebligi por interesatoj partopreni aŭ elementan, aŭ superan Esperantoekzamenon. Pro tio la distrikto la 24-an de aprilo aranĝos ekzamenan tagon en la klubejo de Malmö. Personoj, kiuj intencas partopreni, turnu sin aŭ al Sveda Esperanto-Instituto, aŭ al la prezidanto de la distrikto, Bertil Andreasson, kiuj donos pliajn informojn. Tie oni ankaŭ povas ricevi la ekzamenan regularon.

Jarkunsido

La jarkunsido de la Suda distrikto de SEF okazos la 13-an de marto en Helsingborg. Ĉiu klubo kaj ĉiu rekta membro en la distrikto ricevos alvokon kun programo kaj detaloj pri loko, ktp.

TEDU-aktiviteter

Den aktivivering som skett inom Esperantorörelsen under jubileumsåret 1987 hoppas jag skall fortsätta i ökad takt 1988. TEDU-regionen (som omfattar medlemmar inom T, E, D och U län) planerar nu en gemensam träff i Åsa folkhögskola, Sköldinge (nära Katrineholm) veckoslutet 5 - 6 mars. Start lördag morgon kl 9.30 och avslutning söndag kl 16.00. Under kursen ordnas nybörjarkurs, dels för barn, dels för äldre, fortsättningskurs, och möjligen en kurs för föreningsfunktionärer (ordföranden, sekreterare och kassörer).

Föreläggning ordnas å skolan i dubbelrum (enkelrum kan erhållas mot pristillägg), måltider och kurskostnad ingår i kur-

savgiften, 350,- kr för vuxna och nedsatt avgift för barn.

För deltagare som bor hemma (t ex i Katrineholm) blir kostnaden för mat och kurser 225,- kr. Deltagare från övriga regioner är välkomna. Ankomst fredag kväll kan ordnas, om så önskas. Kostnad för plats i dubbelrum 105,- kr.

Östgötamöte

Klubbarna i Östergötland brukar ha en gemensam träff första lördagen i juni. Gäster från andra län är hjärtligt välkomna till denna. Begär närmare uppgifter om program från Inga Björkeby, Getstigen 14, 582 58 Linköping.

Jubileumsåret

avslutades med aktiviteter i samband med Zamenhofdagen, när man firade esperantobokens dag lite högtidligare än vanligt som en julfest den 11 december i Norrköping. En nybildad sångkör under ledning av Margaretha Skarin framförde La Espero och Malin Söderback läste Zamenhofs dikt La Vojo. En annan av klubbens ungdomar, Johan Franzon, läste Viktor Rydbergs Tomten i esperantotolkning av Nils Johansson. Lucia var Maud Hult-

Plejkoran dankon!

Klubo Cent 1987

Birgitta Hultén Stockholm, 100,-

Klubo Cent 1988

Ljungby Esperantoklubb La Guto, 100,-

Arne kaj Rosa Hermansson, Uddevalla, 100,-

Gustav Nygård, Göteborg, 100,-

Olle Olsson, Lund, 100,-

Ove Kleborgh, Hässleholm, 100,-

Edla Nilsson, Malmberget, 100,-

Jan Strönne, Malmö, 100,-

Anna-Greta Strönne, Malmö, 100,-

Erik Swärd, Malmö, 200,-

Klubo Cent Jaroj

Gustav Nygård, Göteborg, 100,-

Donacoj

Arvid Johansson, Huskvarna, 100,-

Väinö Ölund, Eskilstuna, 100,-

Conny Åkesson, Sibbhult, 50,-

Kungälv's Esperantoklubb, 1.000,-

Verner Sävlund, Knislinge, 100,-

Olle Olsson, Lund: Memore de Tiberio Morariu, 200,-

Mellan-Skånes Esperantoklubb till Nils Enehags minne, 100,-

Koran dankon al ĉiuj donacintoj – kaj donacontoj per poŝtĝirkonto 20 12 - 3, Esperantoförbundet.

gren. De 38 närvarande hjälptes åt att göra slut på såväl bokbordets böcker som norra Europas största stjärnformiga gröna smörgåstårta. Som vanligt var det många gäster från den mycket aktiva nybildade klubben i Katrineholm. Mötet skickade julkhälsningar till ett tiotal utländska esperantister och till vänklubbarna i Tammerfors i Finland och Pointe Noir i Kongo.

Motalaklubben hade hissat esperantoflaggan och bjöd på trevlig underhållning av Nils-Erik Kristofferson från Stockholm. Styrelsen rapporterade att en ungdomssektion håller på att bildas och att en kurs för avläggande av högre esperantoexamen pågår. Dessutom pågår en nybörjar- och en läsecirkel.

U.R.

Nybildad klubb i Skara

Den 2 december bildades den 44:e Esperantoklubben i Sverige, och samtidigt den tredje under jubileumsåret.

Den nybildade klubben har fått mycken hjälp av Skövdeklubben, bl a med lärare för sina kurser. Nu i vår kommer de att starta kurser med ett 20-tal deltagare. En verkligt god början!

Ordförande är Rune Andersson, sekreterare Marie Josefsson och kassör Kjell Hall. Kjell deltar för övrigt i folkhögskolekursen i Karlskoga och är mycket entusiastisk över den.

Klubben har redan en egen lokal, som de själva reparerat och snyggat till. Och de skriver:

“Vårt mål är att få så många som möjligt intresserade av att delta i vår verksamhet och komma till insikt och förståelse för den fina idé esperanto står för.”

Vi önskar lycka till och hoppas att de mycket snart skall nå sitt mål.

Memore al Ivo Lapenna

La tuta Esperantomovado funebrias la forpason de Ivo Lapenna, unu el la plej grandaj figuroj en la historio de la Internacia Lingvo. Profesoro Lapenna estis la arkitekto de la moderna Universala Esperanto-Asocio. Kiel komitato kaj estrarano de la Asocio, kaj kiel ĝia prezidanto dum deko da jaroj, li direktis ĝiajn energiojn al la publika prezento de Esperanto al la plej altaj instancoj. Li estas konata kiel ĉefa rolanto en la akceptigo de ŝlosila rezolucio favora al Esperanto ĉe la Generala Konferenco de Unesko en Montevideo en 1954 kaj kiel pledanto por Esperanto antaŭ ŝtatestroj, intelektuloj kaj sciencistoj.

La firma kaj senkompromisa sinteno de profesoro Lapenna pri la seriozeco de la pretendoj de Esperanto faris lin granda malamiko de ĉia misuzo kaj misprezento de Esperanto, kaj de sektismo kaj diletantismo. Li insistis pri plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia lingvo. Li estis brila informanto por Esperanto – jam en siaj studentaj jaroj en Jugoslavio kaj poste kiel gvidanto kaj inspiranto de la informa laboro de UEA. Tra ĉiuj malfacilaĵoj kaj seniluziigoj li restis senlaca laboranto por la lingvo. Li estas aparte memorata kiel brila oratoro kaj talenta verkisto en la Internacia Lingvo. Multaj ankaŭ memoras lin kiel instruanton kaj inspiranton de tuta pli juna generacio de aktivuloj por Esperanto.

Profesoro Lapenna mortis en la Zamenhof-Tago de la centa jaro de Esperanto. Se lia forpaso markis la finon de unu epoko en la historio de Esperanto, des pli gravas, ke ni daŭrigu konscie kaj kon-

science lian laboron en la duan jarcenton. Nenio alia pli bone taŭgas por honori lian memoron.

Al lia vidvino kaj al ĉiuj aliaj liaj familianoj, amikoj kaj kolegoj mi esprimas, nome de UEA, sincerajn kondolencojn.

Humphrey Tonkin
Prezidanto de UEA

Ankaŭ SEF memoras kun doloro la forpason de Ivo Lapenna

Prof. Dr-o Ivo Lapenna plurfoje vizitis Svedion, la unuan fojon en 1948, kiam li partoprenis la 33-an UK en Malmö kaj prelegis en la kadro de la Internacia Somera Universitato. Jam en 1955 li ricevis la lingvopremion de la Pacasocio de Stokholmo kaj venis al la sveda ĉefurbo la postan jaron (en 1956) por prelegi ĉe la 50-jara datreveno de Sveda Esperanto-Federacio.

La internacian Esperanto-kurson en Uddevalla en 1952, prof. Lapenna ĉeestis kiel preleganto. Kaj jam la postan jaron li estis tre ŝatata inter la prelegantoj ĉe la Sveda Somera Semajno, la prelegsemajno en Frostavallen. Ĉiufoje li estis invitita tien kaj sekve estis gasto en Frostavallen en la jaroj 1953, 1954, 1956, 1959, 1962 kaj 1972.

Prof. Lapenna forpasis en Kopenhago.

SEF

La Suplemento de Plena Ilustrita Vortaro

Mi ege ĝojis, kiam mi la unuan fojon vidis anoncon, ke aperos nova eldono de PIV, provizita per suplemento. Nur kelkajn monatojn poste mi povis akiri tiun suplementon. Ĉi tie mi volas recenzi tiun ĉi gravan verkon, eldonitan kompreneble de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Mi mem ne spertis la perturbojn en nia movado, kiujn kaŭzis la aperoj de unue Plena Vortaro, poste Plena Vortaro kun Suplemento kaj fine kaj pleje Plena Ilustrita Vortaro, sed laŭ kelkaj raportoj nur la Ido-krizo estas komparebla. Estas verŝajne tiel, ke tro multaj esperantistoj

ne konscias, kiom da absolute nemalhaveblaj radikoj ankoraŭ mankas kaj longatempe mankos en nia lingvo. Ja en PIV kaj ankaŭ en PIV-S enestas radikoj, kiuj laŭ mi estas kritikindaj kaj kiuj eble ne ekzistu en ajna formo. Sed tiu, kiu kredas, ke Esperanto povas taŭgi kiel tutmonda komunikilo kun nur la kelkmil radikoj, kiuj ekzistis en la komenco de nia jarcento, tiu vivas en rozkolora nubo forege de la vera vivo.

Mi mem sentegis la mankon de popularmuzikaj vortoj, ĉar mi aktivis tiukampe, kaj bonŝance PIV-S iomete tuŝis tiun fakon. Temas efektive nur pri guteto en

ankoraŭ neekzistanta marego, sed ja tre bonvena guteto.

PIV-S enhavas ĉirkaŭ 1000 kapvortojn, el kiuj duono estas tute novaj, kaj la aliaj estas diversaj modifoj, korektoj kaj aldonoj al la jamaj vortoj en PIV. Ĝi estas nura provizoraĵo antaŭ la apero de tute novredaktita vortarego. Ni esperu, ke ne daŭros longe ĝis tiu venos, ĉar vere oni tuj rimarkas en PIV-S ĝian provizorecon. Multaj vortoj estas preskau ŝoke mallonge kaj pase difinitaj, kaj estas foje tre malfacile scii, kio estas aldonoj al malnova difino kaj kio estas novaĵo. Kelkloke estas strangaĵoj, sed ili certe malaperos en

Inbjudan till Kurs i Esperanto med internationellt program

- VAR? På Nordiska folkhögskolan i Kungälv.
NÄR? 8 - 12 augusti 1988.
VAD? Esperantokurser i 4 olika nivåer med utländska pedagoger. Föredrag i olika ämnen. Diskussioner, kvällsprogram typ förströelse, studiebesök el. utflykt, poängpromenad i de natursköna omgivningarna, m.m.
VAD KOSTAR DET? 1.750,- kr, inkl. mat och logi (i ett- eller tvåbäddsrums), kurs material och program. (Reservation för ev. prishöjning.)
HUR SKA MAN ANMÄLA SIG? Sänd anmälningsavgift, 200,- kr, till pg 71 93 50 - 1, Kungälv's Esperantoklubb.
(Anmälan utan betald avgift gäller inte.)

Nordiska folkhögskolan, Kungälv i samverkan med Svenska Esperantoförbundet, västra regionen, och Kungälv's Esperantoklubb.

Sök dagstudiesöd för inackorderingsbostad och förlorad arbetsförtjänst hos Vuxenutbildningsnämnden i ditt län, senast den 15 maj. Alla kan söka. Hämta blankett på Arbetsförmedlingen eller beställ från Vuxenutbildningsnämnden i länet.

la venonta PIV-ego.

Jen kelkaj interesaj kaj bonaj novismoj:

Aideso - la fama malsano (AIDS - SIDA). Eble vi demandos vin, de kie venas la "e". Ankaŭ mi ne scias. Eble la vortaristo pensis, ke en la amaso da akronimoj (vortoj kreitaj el mallongigoj) la "o"-oj estas tro multaj (Usono, forogo, godoro, ktp), kaj tial simple variis per alia vokalo. Ĉiukaze por mi ne gravas, kia estas la vorto. Nun ni almenaŭ vorton havas.

Dezajno - formo kaj aspekto de (industriproduktita) objekto.

Hoso - fleksebla tubo el kaŭĉuko, plasto aŭ metalo.

Fuelo - substanco, el kiu energio estas liberigebla.

Pico - finfine vorto por la ĉie konata italdevena manĝaĵo. Kompreneble ĉiuj internaciaj manĝaĵoj havu esperantajn nomojn.

Bosanova, regeo, ritmenbluso, rokenrolo (kaj **rokmuziko**, sed nur ene de la difino de rokenrolo) - ankaŭ multaj aliaj muzikstiloj bezonas esperantigojn.

Serviro - la komenca bato ĉe pilkludoj, kiel teniso, volejbalo, ktp.

Enestas ankaŭ kritikindaj vortoj. Mi traktos poste la landnomojn, temo pri kiu mi iom spertas. Sed unue kelkaj detalaj negativaj komentoj:

D.A.N. - preseraro, devas esti D.N.A.

Drogo - estas malrekomendita en la senco de sveda "drog", angla "drug". Anstataŭe PIV-S donas **toksiko, toksikomaniulo**, ktp. Mi vere dubas pri la valoro de tiu rekomendo. Kiu sekvos ĝin?

-atoro - sufikso por granda, aŭtomata ilo, multe uzata en PIV-S, sed malmulte de la esperantistoj. Kunlaboranto de PIV-S estas Ruediger Eichholz, kiu de jaroj propagandas la uzon de tiu tre dubinda sufikso. Kial li rajtas senkritike uzegi ĝin en PIV-S?

Komputoro - nun la debato denove akriĝos. Por mi ne gravas, kiu venkas. Sed mi esperis pri "komputilo", ĉar ĝi estas uzata de la plimulto. Nun, kiam PIV-S ekstaris sur la flanko de "komputoro", mi ne scias kion fari, ĉar mi ankaŭ volas, ke PIV(-S) estu la normo, pri kiu ĉiuj pli-malpli konsentas. "Komputilo" estas en PIV-S uzata kun stranga signifo, kiun certe neniu bezonas. Denove Eichholz regas.

Interfono, interkomo - mi tute ne povas kompreni la sencodiferencon.

Freŝa - difiniĝas kiel ĵaza stilo! Ĉu ne estu freŝa ĵazo?

Kordilero - difinita kiel hispana (!) montepiteto. Ĉu PIV-S ne estu esperanta vortaro? Sed la finaĵo ja estas -o, kvankam kiel epiteto, ĝi devus havi -a, do supozeble estas hispana vorto... sed...

Miksta - Tre dubinda bezonateco. Kial ne simple miksitaj?

Virjo, viruso - antaŭe ĉio estis facila. Kiam mi en la sveda uzus "virus", mi diris "viruso" en Esperanto. Nun mi tute ne scias kion diri. Kiel nefakulo mi ne scias elplekti la difinojn de "virjo" kaj "viruso". Kial ne povas esti same simple, kiel en mia angla vortarego: Virusoj - vivanta estaĵo eĉ pli malgranda ol bakterio, kiu kaŭzas infektajn malsanojn en la korpo, en plantoj, ktp. Ĉu PIV-S estu nur por fakuloj?

LANDNOMOJ

Unu el la celoj de PIV-S, esprimita en la antaŭparolo, estis akordigi PIV-on kun la lastaj decidoj de la Akademio. Pri la landnomoj la Akademio multon faris lastatempe, sed ŝajnas, ke nur la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (1974) atingis la redaktantojn de PIV-S, ĉar la landnomoj en PIV-S tre malobeas al la lastatempaj "Rekomendoj pri la landnomoj", kaj fakte ankaŭ al la spirito de tiu oka aldono mem. Oni povus

esperu, ke ĉar kunlaboris André Albault, kiu mem prizorgas la landnomojn en la Akademio, estus iom da ordo en PIV-S tiurilate. Nun estas evidente, ke iu alia dominis tiun kampon en la verko. La nekredible stulta rimarkigo ĉe "Meksiko" (oficiala formo por tiu lando) estas rekordo de malbona vortarlaboro. La Akademio ne nur oficialigis "Meksiko", sed ankaŭ "Gvatemalo", "Nikaragvo", "Panamo", "Paragvajo" kaj "Urugvajo". Tio klare montras, ke oni ne aldonu iajn superflujajn "i"-ojn en tiaj nomoj (Meksikio, Gvatemalio, ktp), eĉ se estas samnoma urbo aŭ simile en la lando. PIV-S male, tute sen esplori kiel vere statas pri la landnoma problemaro, aperigas interalie: "Belizio", "Eburio", "Kampuĉio", "Kuvajtio" kaj "Zairio". Kie estas la konsekvenco, se samtempe en PIV(-S) aperas "Monako", "Sanmarino" kaj "Singapuro", ĉiuj kun samnomaj ĉefurboj!

Cetere aperas ankaŭ la jenaj stultajoj: Belizo estas nomata ĉefurbo de Beliz(i)o, kvankam jam delonge ĉefurbas Belmopano; "Burkina-Faso", kvankam ĝi ĝenerale estas nomata simple Burkinjo; "Nov-Gvineo Papulando", devus esti Papuo-Novgvineo, kiel en ĉiuj aliaj lingvoj (cetere, onidire oni ĵus ŝanĝis la nomon); "Sankta Lucia" - ŝajne ne nur virinoj, sed ankaŭ insuloj povas finiĝi per -a anstataŭ -o; "Verdkaba Insularo", kvankam delonge la stato nomiĝas simple Kabo Verda.

Estus pli bone, se oni estus atendinta la aperontan liston de normaj landnomoj, kiun prilaboras la Akademio, kaj tute ne tuŝinta tiun kampon.

Resume mi diru, ke malgraŭ kelkaj kritikindaĵoj (ĉu povus ne esti?), mi konsilas al ĉiu esperantisto nepre havigi al si tiun ĉi verkon. La juna lingvo Esperanto evoluas ege rapide.

Bertil Wennergren

Interhoma kompreniĝo Interpopola paco

Inter la 31-a de oktobro kaj 1-a de novembro okazis en Helsinki seminario kun la titola temo. Estis la Monda Packonsilio kiu invitis Universalan Esperanto-Asocion al tiu komuna diskuto pri paco kaj interkompreniĝo.

Partoprenis 35 personoj el 13 landoj. El tiuj, deko estis MPK-anoj, la ceteraj estis esperantistoj.

Reprezentantoj kaj prelegantoj de UEA estis Humphrey Tonkin, Barbara Despiney, Mark Fettes kaj Osmo Buller, de TEJO Jan Koszmaluk.

MEM (Mondpaca Esperanto-Movado) estis reprezentata de Imre Pethes kaj Clément Tholet; la pola radio de Andrzej Pettyn; SEF kaj SEJU de Märtha Andréasson kaj Elisabeth Ahlgren; NEL kaj NEJU de Douglas Draper kaj Marianne Lund.

Same reprezentis kaj prelegis de la Monda Packonsilio, MPK, Romesh Chandra, Hindio, Mamadou Sako, Malio, Marilyn Olsson, Finnlando, Nina Baltvinsdottir, Islando, kaj Sana Abou Chakra, Libano. Kompreneble la finna Esperantomovado estis bone reprezentata.

Konferencaj lingvoj estis angla kaj Esperanto. La tuta konferenco estis dulingva. Interpretistoj estis Mark Fettes kaj Humphrey Tonkin. Marilyn Olsson kaj Mark Fettes prezidis kaj gvidis la seminarion.

Plej multaj el la paroladoj estis mallongaj kaj enkondukis al sekva debato. Ĝi estis ofte tre vigla, kaj la ĉiama interpretado forŝtelis multe da tempo. Tonkin, en sia enkonduka parolado, i a aludis al tio, rakontante, ke en Varsovio renkontiĝis 6.000 homoj el 60-o da landoj sen interpretistoj. Estis la 72-a fojo, ke la homoj tiel

kolektiĝis por kunsidi kaj diskuti komunajn problemojn, por ĝui kulturajn eventojn kaj kune babili kaj amuziĝi. La kongresaj diskutoj temas ne nur pri lingvaj problemoj, sed ankaŭ pri ekz. internacia komunikado kaj kompreniĝo, kaj paco. Li memorigis pri la vizito al Treblinka kaj la

ekskurso al Bjalistoko, kaj al la t n "Deklaro de Bjalistoko". Tiu deklaro estis direktita al la ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo. La deklaro emfazas, ke "manko de scio" estas "unu el la plej grandaj kaŭzoj de malamikeco inter la diversaj landoj de la mondo". Kaj "unu el la plej grandaj obstakloj al

El la Fina dokumento de Helsinki

La du organizaĵoj konsentas entrepreni la jenan agadon:

1. Ĉiu organizaĵo invitos la alian partopreni aŭ observi taŭgajn kunvenojn kaj konferencojn.

2. La du organizaĵoj konsentas kunlabori kadre de la Speciala Sesio pri Malarmado de la Generala Asembleo de UN en 1988 kaj por festi la 40-an datrevenon de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj.

3. En la kadro de Unesko, la du organizaĵoj konsentas kunlabori en agadoj, kiuj rilatas al la Monda Jardeko por Kultura Evoluo.

4. UEA ludos aktivan rolon en la konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri elradikigo de la bildo de la malamiko, kiun organizos MPK kune kun aliaj neregistaraj organizaĵoj en Genevo, februaron 1988.

5. UEA konsentas antaŭenigi la diskuton pri la temo de paco, kadre ankaŭ de la diskuto pri internacia kunlaboro kaj kompreniĝo, en ĉiuj siaj agadoj, inkluzive de la laboro je loka kaj landa niveloj; tiucele, kun helpo de MPK, ĝi publikigos taŭgajn diskutmaterialojn kaj distribuos ilin pere de siaj aliĝintaj kaj kunlaborantaj organizaĵoj.

6. UEA daŭre elstarigos la antaŭenigon de la paco, ekzemple per speciala Tago de la Paco en la Universalaj Kongresoj, kaj kune kun sia junulara sekcio, TEJO, daŭre emfazos tiun temon en ĉiuj taŭgaj konferencoj kaj kunvenoj de UEA kaj TEJO.

7. MPK konsentas antaŭenigi la uzon de Esperanto kiel komunikilo ene de la pacmovado, konsilate kaj helpate de UEA.

8. UEA konsentas traduki en Esperanton taŭgajn materialojn de MPK de tempo al tempo, kaj helpi pri ilia distribuo.

9. MPK kaj UEA kunlaboros pri agadoj sekvaj al ĉi tiu seminario, inkluzive de la ebleco organizi konferencojn pri Lingvo kaj Paco en Parizo, 1989, al kiu aliaj neregistaraj organizaĵoj estos invitataj. Oni petos la subtenon de Unesko por tiu ĉi iniciato.

10. MPK kaj UEA kunmetos la referaĵojn el ĉi tiu seminario kaj aranĝos la publikigon de la plej reprezentaj referaĵoj en eldonaĵoj de la pacmovado kaj la Esperanto-movado.

La partoprenantoj esprimis la esperon, ke la baldaŭa pintkunsido inter Usono kaj Sovetunio konsistigos unuan paŝon al elimino de nukleaj armiloj kaj redukto de internacia streĉiteco.

Helsinki, 1 novembro 1987

tiu senpera komunikado estas manko de komuna lingvo”.

Chandra i a menciis, ke la mondo ŝanĝiĝis, la armiloj, kiuj nun ekzistas, estas tiel teruraj, kiel ni neniam antaŭe spertis, kaj pli kaj pli evoluigas. Tial ĉiuj fortoj devas unuiĝi en la defendo de la paco. Li bonvenigis la iniciaton de la Esperantomovado akcepti la starigon de komuna konferenco. Nuklea milito signifus, ke nur temas pri kiu mortu unue - en la unua ondo aŭ post monatoj pro la radiado. Li invitis al konferenco en Genevo kun temo “Kiel depreni bildon de malamiko”, kiel kontraŭstaro al ĉiuj filmoj, libroj kaj aliaj propagandiloj, kiuj malhelpas la strebadojn de la pacorganizoj forpreni antaŭjuĝajn bildojn. “Unu afero estas tute klara”, li diris, “Ni komencis kompreni la signifon de la laboro de la Esperantomovado”.

Saman deklaron faris ankaŭ la ceteraj MPK-anoj. Unu el ili diris ia, ke li tuj je la hejmenveno intencas kontakti la lokajn Esperantoklubojn por daŭrigi la kunlaboron.

Speciale ŝatata estis la prelego de Mark Fettes, sed ankaŭ la ceteraj ricevis sufiĉan atenton. Marilyn Olsson diris, ke la pacmovadoj nun devas lerni diri “jes” anstataŭ “ne”. Oni devas prezenti sian ideon pri “nova mondo”, ne nur diri “ne” al la nuna milita mondo.

Je la fino de la seminario Humphrey Tonkin prezentis la komunan resumon kaj la konkludojn. Parolis ankaŭ Romesh Chandra. Eltiron el la dokumento vi povas legi aparte.

En la sabatovespero ni estis invititaj al la Esperantoklubo de Helsinki. Ĉeestis 50-o da membroj. Estis i a mallongaj prezentoj de la laboroj de UEA kaj de la Centra Oficejo fare de Humphrey Tonkin kaj Mark Fettes. Krome estis prezentitaj la laboroj kaj agadplanoj de la sveda kaj norvega Esperantoasocioj.

Märtha Andreasson

Abonu *El Popola Ĉinio*

Tiuj, kiuj ekabonas aŭ reabonas nian gazeton en la unua abonvarba kampanjo, daŭranta de la 1-a de oktobro 1987 ĝis la 29-a de februaro 1988, povos senpage ricevi koloran kalendaron por 1988 en Esperanto. La kalendarojn por la abonantoj ni ekspedos al ili rekte el Ĉinio.

Rilate la abonkotizon ni aplikos la saman tarifon, kiel por 1987, senŝanĝe:

1 jaro	90,- SEK
2 jaroj	150,- SEK
3 jaroj	210,- SEK

Por iom esprimi nian dankon al la fervoraj abonvarbantoj, kiuj aktive konigas nian gazeton inter esperantistoj kaj aktive varbas por ĝi abonantojn dum la kampanjo, ni donace sendos al ili modestajn memoraĵojn ĉinstilajn (kajeron kun brikata kovrilo, aŭ saketon kun blank-bluj desegnaĵoj, aŭ artefartan rulbildon) laŭ ilia atingo en la varbado.

Sendu vian abonon al la landa peranto:

Lisbet Andreasson
Södra Rörum pl 455
242 00 HÖRBY
pĝ 14 74 29 - 5,
Esperantoförbundet,
Specialkonto



Kultura Esperanto-Festivalo # 2

Antaŭ unu kaj duona jaro naskiĝis en la sveda parto de Esperantujo nova fenomeno: La Kultura Esperanto-Festivalo. Dum tri tagoj ĝi estis okazigita en Upsalo, dum tri tagoj oni kolektiĝis tie por prezenti kaj sperti la originalan Esperantokulturon.

La festivalon aranĝis la KEF-organizo, kiu konsistas ĉefe el junaj Esperantoaktivuloj el Stokholmo. Kiam la printempaj tagoj de KEF 1 estis pasintaj, ni sumigis la impresojn kaj konstatis, ke ni sentas inspiron. El tiu inspiro venis la decido nun inviti al Kultura Esperanto-Festivalo 2, okazonta en Lund inter la 18-a kaj 21-a de aŭgusto 1988.

En tiu ĉi momento ni kalkulas je prezentoj de inter aliaj Jarlo Martelmonto, poeto, Persone, rokmuzika grupo, Roman Bura, pola trobadoro, La Krizalido kaj TESPAs, francaj teatraj grupoj. Kompreneble ankoraŭ bonvenas proponoj pri artistoj. Reklamon por la festivalo ni faris, ekzemple, dum la pasinta jubilea somero en Pollando, kaj ni esperas pri partoprenontoj el multaj diversaj landoj.

Finance, la KEF-organizo devas fidi je fondusoj kaj donacoj.



Sciante, kiel malcertaj tiaj enspesfontoj ofte estas, ni bonvenigas ĉian ekonomian helpon. Kiam KEF 1 estis preparata, multaj kluboj kaj unuopaj esperantistoj lojale subtenis la festivalon per mondonacoj. Espereble simila malavareco troviĝos inter la membroj de SEF ankaŭ ĉi-foje. La poŝtĝira konto estas 488 88 54 - 9, Kultura Esperanto-Festivalo.

La "ideo" de KEF estas, ke la originala kulturo de Esperanto tre gravas – ĝi ĉiam meritas kaj bezonas atenton kaj instigon. Ĝi ankaŭ bezonas pli da bonaj eblecoj prezenti sin. Esti parto de tio ĉi estas la celo de la Kultura Esperanto-Festivalo.

Lena Månsson

Dankon

al ĉiuj esperantistoj en Svedio, kiuj kunhelpis progresigi la lingvon dum la jubilea jaro. La estraro de SEF korege dankas al ĉiuj kaj deziras por 1988 "lingvan rajton por ĉiu homo."

ILEI-konferenco

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazigos sian 22-an Internacian Konferencon en Kerkrade, Nederlando, inter la 16-a kaj 23-a de julio, do la semajnon antaŭ la Universala Kongreso en Rotterdam.

Bona okazo en ne tro granda rondo praktiki Esperanton, aŭskulti prelegojn, diskuti, ekskursi kaj ĝui la amikan etoson. Dum la konferenco Internacia Esperanto-Instituto aranĝos kurson por komencantoj, gvidotan laŭ Cseh-metodo, kaj seminariojn A kaj B por Esperanto-instruantoj, kun celo doni kompetentecon de Cseh-instruisto. La Cseh-aranĝoj estas pagendaj aparte.

La kotizo de la konferenco estas malalta kaj inkluzivas loĝadon, tri manĝojn tage kaj uzon de diversaj ludejoj en la konferencujo.

Kostoj antaŭ 1988-03-31: Unulita ĉambro 440 guldenoj, dulita 420, trilita 400 kaj kvarlita 380 guldenoj.

Interesatoj sin turnu al:

**Bertil Andreasson,
Södra Rörum pl 455,
242 00 HÖRBY.**

Dana jarkongreso 1988

La dana jarkongreso okazos inter la 23-a kaj 24-a de aprilo 1988 en la sudselanda urbo Næstved. La kongreso estas komuna aranĝo de la danaj Esperanto-organizadoj.

En la sama urbo la junularo okazigos sian jarkunvenon inter la 22-a kaj 24-a de aprilo.

Informoj ĉe Esperanto-Unuigo de Næstved,
Fyrrevænget 4,
DK-4700 Næstved.
Tel. 45-03 72 12 40.

Esperantobok på svenska

Att svensk litteratur översätts till esperanto upplever vi då och då. Motsatsen är synnerligen ovanlig, men nu har det hänt: Leif Gunnar Nordenstorm, som deltog i vår översättningstävling (se *La Espero* nr 2/87), har nu utgett den bok han tävlade med, "Kumeuaua, djungelns son".

Författaren Tibor Sekelj skrev och utgav boken ursprungligen på esperanto, och sedan har den översatts till femton språk före den svenska upplagan. Den japanska utgåvan utsågs av Japans utbildningsdepartement till en av de fyra bästa ungdomsböckerna 1984.

I.N.

Geedziĝo

Esperanto denove estis edzperanto. En Budapeŝto kristnaske geedzigis la SEF-kasisto Börje Andersson, Skövde, kaj Charlotte Forras, Szekesfehervar, Hungario. Ni kore gratulas kaj esperas, ke Charlotte sentas sin hejme en sia nova hejmlando.

85-jara Karl Söderberg

La 6-an de januaro Karl Söderberg el Uppsala povis festi sian 85-an naskiĝjaron.

Instruisto, rektoro, lerneja direktoro ĝis sia pensiigo en 1969 – jen lia nemovada kariero. Kiel esperantisto li agis kiel direktoro de Sveda Esperanto-Instituto inter 1939 kaj 1972 kaj membro de la Akademio de Esperanto. Dum 15 jaroj li estis reprezentanto de la sveda registaro ĉe la Universalaj Kongresoj.

Koran gratulon kaj multajn pliajn jarojn!

REA REA REA REA

Vi har plockat ihop paket med skön-, fack- och barnböcker av titlar som funnits en tid på vår boklista, och säljer till ungefär halva priset.

Passa på nu, barnpaketet kostar 50 kr, övriga 100 kr.

TIPS TIPS TIPS TIPS

Ett tips till nybörjare eller den som inte är van att läsa så mycket på esperanto:

Köp ett paket med boken om indianpojken Kumeŭaŭa, på esperanto och i svensk översättning. Pris 100 kr.

FÖRSTA BOKEN

Har du ännu inte ett ex av den första svenska esperantoläroboken? Numrerad faksimilupplaga, pris 100 kr, hälften går till att stärka SEF:s kassa.

Sur nia bretaro

Interlingvistiko kaj Esperantologio	73:-
Oranĝa ombrelo	21:-
Auld & Maul: Sub la signo de socia muzo	158:-
Arnaudov: Amuza matematiko por gelemantoj	47:-
Gáll: Obsedita de l'suno	81:-
Gishron: Lingvo kaj religio	171:-
Lapenna: Kritikaj studoj defende de Esperanto	125:-
Linz: Kion travivis aŭstria familio...	128:-
Lusin: Sovaga herbaro	13:-
Pauli: Mil jaroj de kristana filozofio	175:-
Silfer: Desislava ridetas	127:-
Sulco: Pledo por unueca lingvo	246:-
Thien: La vivo de D-ro L.L. Zamenhof en bildoj	114:-

I priserna ingår porto. Vid köp över 500 kr lämnas 5 % rabatt.

EsperantoCentro	eller	Esperantoförlaget
Brunnsgatan 21		Box 7502
11138 STOCKHOLM		200 42 MALMÖ
postgiro 20 12 - 3		postgiro 578 - 5

STEN SVENONIUS
ERIKSTORPSSGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

La Espero, Brunnsgatan 21, 111 38 STOCKHOLM

AVGIFTER

Kongressavgifter Rotterdam

	Till	Från
	14/5 88	15/5 88
1. Direkt medlem i UEA	550:-	660:-
2. Icke direktmedlem i UEA	660:-	770:-
3. Kunulo/junulo/handikapulo, som själv är direktmedlem i UEA	330:-	440:-
4. Kunulo/junulo/handikapulo som inte själv är direktmedlem i UEA	440:-	550:-

Medlemsavgifter UEA

MJ medlem med årsbok	88 kr
MA medlem med årsbok och tidningen Esperanto	220 kr
DM dumviva membro kostar	5.500 kr
men då får man tidningen Esperanto och årsboken under hela sitt liv.	

Beställ anmälningsblankett till Rotterdamkongressen hos Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 00 Hörby, tel. 0415/501 52. Blanketten skall sedan tillbaka till samma adress. Betalning av kongressavgifter och medlemsavgifter till UEA sker till pg 14 74 29 - 5 Esperantoförbundet, specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

Medlemsavgifter SEF

Direktansluten medlem	100 kr
Direktansluten familjemedlem (utan tidning)	50 kr
Direktansluten ungdomsmedlem	50 kr

Medlemsavgifter till SEF betalas till postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Se sid 2 för mera information.

Alva Myrdal - Esperantisto dum juneco

Kiom da nuntempaj esperantistoj en Svedio scias, ke Alva Myrdal iam lernis Esperanton?

En sia libro "Alva - ett kvinnoliv", la filino de Alva Myrdal, Sissela Bok, skribas:

"Krome ŝi lernis Esperanton, kion ŝia puritane idealista patro povis akcepti, kaj studis astronomion ĉe Hermod's."

La informon la leganto trovas en la ĉapitro pri la junaj jaroj de Alva Myrdal. Alva diris, ke ŝi post la elementlernejo estis "la plej naiva idealisto, kiun oni povas imagi"... Ŝi klopodis trovi praktikajn vojojn el la densa taga vivo. Kaj la lernado de Esperanto estis unu el tiuj vojoj.

B.A.

Vi påminner om...

Det har visat sig att postens bok *Skriv brev på esperanto* effektivt reklamerar för esperanto. Ideligen får vi exempel på hur den boken blir mångas första kontakt med det internationella språket, när de träffar på den på posten eller i biblioteken. Det är därför ett måste att boken ska finnas i biblioteken på din hemort, i vänt-salar, skolor eller eljest där folk sitter och bläddrar i tidningar. Den kostar inte mer än en veckotidning.

Gör så här: Gör en inbetalning på 14,- kr till pg 185 - 9, Postverket. Skriv ordet *Esperantoboken* på talongen och sätt ut ditt namn och din adress, om du vill ha hem boken, eller namn och adress på den/dem du vill ge boken.

Ett bra sätt att sprida kunskap om vårt språk.